

La Voĉo de Kongreso

Eldono okaze de la 22a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — Parizo, 30a de julio - 5a de aŭgusto 1949a

Sekretariino: Simone GLODEAU, 115, B^a.-Briand, Montreuil. — Kasisto: Edmond DAZEN, 9, rue de l'Avre, Paris-15^e. Poŝtkonto 1566-36 Paris

Aligintoj je la 10-a de julio

Argentino.	1
Aŭstrio.	33
Belgio.	12
Brazilio.	1
Britio.	115
Ĉeĥoslov.	106
Danio.	119
Finlando.	8
Francio.	391
Germanio.	28
Islando.	2
Italio.	1
Meksikio.	1
Nederlando.	430
Norvegio.	13
Portugalio.	5
Sarlando.	5
Svedio.	179
Svisio.	1
Usono.	4
1.455	

Tiuj ciferoj estas publikigataj precipe por la ĉirkaŭ 100 subtenantoj k por la gek-doj (precipe el Centra Eŭropo), kiuj pro diversaj motivoj ne povis ĉeesti la Kongreson.

O.K.K.

Bonvenon!

Kiam ni deklaris en Amsterdamo : « Ni invitas vin, gek-doj el ĉiuj landoj, por kongresi venontjare en Parizo », ni sentis, ke la respondeco, unue malpeza eĉ agrabla, fariĝos ĉiunomate, ĉiusemajne, ĉiutage pli preciza, pli truda.

Ni sciis, ke monto da malfaciloj staros antaŭ ni. Ne ebeniĝos la monaj interŝanĝoj inter la diversaj landoj; ne malleviĝos facile la limoj, kiuj nin disigas el niaj gek-doj de la transpireneaj landoj, de centra k orienta Eŭropo. Multaj ne povos veni ĉar la financa situacio de la familie ne ebligas vojaĝon k restadon en la tro malproksima kongres-urbo.

Ĉu la solvo de tiuj gravaj problemoj ne restos preter niaj kapabloj k niaj limigitaj fortoj?

Ekde oktobro komenciĝis sistema esplorado ĉe oficialaj instancoj. Kontaktoj ebligis preni favorajn poziciojn sed gravaj problemoj kiel la veno de la k-doj el Germanio, Aŭstrio k Ĉeĥoslovakio restis ĉiam ne precize solvataj.

Ĉirkaŭ 1.500 gek-doj aliĝis. Por redukti kiel eble plej la koston de ilia restado, amasgastejoj estis organizataj. Tio ĉi estas versaĵne la entrepreno, kiu postulis la plej gravan laboron de O.K.K.

Tiu grandega urbo kun siaj ses gravaj stacidomoj, sia senlima trezoro vizitinda devigas al speciala kongres-organizado. K jen, esperantistaj infanoj deziras viziti Parizon, k-doj deziras veni kelkajn tagojn antaŭ la kongreso, aliaj deziras resti kelkajn tagojn poste k fine iuj deziras vojaĝi tra Francio. Ne plu temas pri ordinara kongreso, sed pri granda renkontiĝo. kies datlimoj najbaras la 20-an de julio k la 15-an de aŭgusto.

Ni konfesu, ke ne sola O.K.K. preparis ĉion, multaj helpis en Parizo. en Francio k eĉ ekstere. Ni varme danku ilin k speciale K-don Bultemejer, kies konsiloj, laboro k afabla helpemo estis al ni ege utilaj.

Ĉu kredeble! Ĉirkaŭ 100 gek-doj helpos pli malpli al la funkciado de la kongreso. Ĉu la mekanismo antaŭpreparita bone funkcios? Ĉu ĉiu plenumos la petitan servon?

Mirige estus se ĉio irus absolute glate; certe motivoj pri plendoj ne mankos. Tamen, dum pli ol 10 monatoj kolektivo laboris, laboregis por ke la gek-doj ĝuu interesan k klerigan kongreson.

Nun venis la tempo por ke vi, gek-doj el ĉiuj landoj uzu la aparaton kiun ni tiom zorge konstruis. Ni ĉiuj alportu la necesan disciplinon, por ke nia nunjara kongreso lasu al ĉiuj memorajojn agrablajn, instruojn fekundajn.



Konkord-placo. Obelisko k Efel-Turo.

(Photo Yvon)

DETALE PROGRAMO

Vendredo, 29-a de julio

Akcepto en la kongres-domo, salono G.
20a h. 30 ĝis 22 h. 30 : Vizito en Luvro, fako de la antikvaĵoj speciale lumigata.

Sabato, 30-a de julio

Akcepto dum la tuta tago en la kongresejo.

Funkciado de la diversaj servoj.

15 h. ĝis 18 h. : Promenado : Stel-placo, Elizeaj Kampoj, Konkord-placo, Tegoleja ĝardeno.

20 h. 30 ĝis 23 h. 30 : *Interfratiĝa Vespero* : Prologo, salutvortoj, kabareto sub la gvidado de la humoristo, Schwartz.

Dimanĉo, 31-a de julio

Frumatene : Bicikla vizito al la urbo.

8 h. ĝis 9 h. *Fakaj kunsidoj*.

9 h. 30 ĝis 11 h. 30. *Unua laborkunsido* : elekto de la diversaj kongres-instancoj, raporto.

11 h. 30 ĝis 11 h. 45. *Parolata gazeto*.

14 h. *Fotado* okazos sur placo « Baudoyer » antaŭ distrikta domo. Metro-stacio « Hôtel de Ville ». Je la 14 h. 30 akurate la fotado okazos. Ĉar la trafiko estos devojigata, la tempo estos limigata.

16 h. ĝis 18 h. 30. *Dua laborkunsido* : diskutado pri la raportoj k voĉdonoj; prezentado de proponoj, diskutado k voĉdono.

20 h. 30 ĝis 23 h. 30. *Vespera promenado* : ekiro de la kongresejo al praurba insulo, Katedralo, Juĝeja Palaco, Luvro, Tegoleja ĝardeno, Konkord-Placo, Elizeaj Kampoj k Triumfarko.

Pro la postuloj de la policaj instancoj, oni grupiĝu po 40 aŭ 50 personoj ĉirkaŭ la gvidantoj. Tiuj ĉi tenos diskojn numeritajn (de 1 ĝis 30) k donos kelkajn klarigojn survoje. Dum la promenado ni restu ĉiam kun la sama gvidanto!

Atentu! La gek-doĵ maljunaj aŭ lacaj rendevuu je la 21a h. sur la Konkord-placo k atendu la promen-vicegon, k ĉiuj trairu la placon k laŭiru la faman avenuon ĝis la Triumfarko.

Subteriĝo al la gastejoj en « Etoile ».

Lundo, 1-a de aŭgusto

8 h. ĝis 9 h. *Fakaj kunsidoj*.

9 h. 30 ĝis 11 h. 30. *Tria laborkunsido* : fino de la debato pri la kongres-proponoj. Elekto de la venonta kongres-urbo. Gvidrezolucio. Eventualajoj.

11 h. 30 ĝis 11 h. 45. *Parolata gazeto*.

14 h. ĝis 17 h. *Aŭtobusa vizito* al la urbo. La aŭtobusoj ekiros akurate je la 14 h. el la gastejoj A k B. Por tiuj, kiuj ne manĝos en unu el tiuj gastejoj, okazos speciala foriro el la katedrala placo (Metro-stacio « Cité »). La aŭtobusoj pasos antaŭ la ĉefaj vidindaĵoj, la gvidantoj donos klarigojn.

17 h. Ĉiuj aŭtobusoj regrupiĝos ĉe la Urbodomo, kie okazos akcepto.

20 h. 30 ĝis 23 h. 30. *Debato* pri « La gesto de Garry Davis ». Prezidanto k enkondukanto k-do Jacobsen. La parolo estos unue al tiuj, kiuj jam sin anoncis, poste al iu ajn. Konkludo de la prezidanto.

Mardo, 2-a de aŭgusto

8 h. ĝis 9 h. *Fakaj kunsidoj*.

9 h. 30 ĝis 10 h. 30. *Prelego* de k-do Laurat pri « Novaj aspektoj de la tutmonda ekonomio k Esperanto ».

10 h. 30 ĝis 11 h. 30. *Prelego* de k-do Barthelmes pri « La Historio de SAT ».

11 h. 30 ĝis 11 h. 45. *Parolata gazeto*.

14 h. ĝis 15 h. 30. *Pedagogia kunveno* : ĉiuj, kiuj interesiĝas pri instruado k edukado, ĉeestu tiun kunvenon. Fakaj kunsidoj.

16 h. ĝis 18 h. 30. *Vizito* : Fajrobrigado, Studenta Civilo, Granda Magazeno, Praurba Insulo.

20 h. 30 ĝis 23 h. 30. *Debato* pri « La Kojonia problemo ». Prezidanto k enkondukanto k-do Rosenbloom. La parolo estos donata unue al tiuj, kiuj jam sin anoncis, poste al iu ajn. Konkludo de la prezidanto.

Merkredo, 3-a de aŭgusto

8 h. ĝis 9 h. *Fakaj kunsidoj*.

Enskribiĝo por la sabata ekskurso al *Versajo* k pago de la vojaĝo (35 fr.) en la Informejo.

9 h. 30 ĝis 10 h. 30. *Prelego* de k-do Leereveld pri « Forto k malforto de la homaro ».

10 h. 30 ĝis 11 h. 30. *Prelego* de k-do Waringhien pri « Magio hieraŭ k hodiaŭ ».

11 h. 30 ĝis 11 h. 45. *Parolata gazeto*.

14 h. ĝis 18 h. 30. a) *Vizito* al la Efekturo por la gek-doĵ, kiuj havas kongres-numerojn de 1 ĝis 750.

b) por la ceteraj kongresantoj, vizitoj al : Luvro, Katedralo, Montmartro, Palaco de la Eltrovoj, Muzeo de l'Homino, Modernaj Artoj.

20 h. 30 ĝis 23 h. 30. *Rendevuo en Operdomo*, metro-stacio « Opéra », kie okazos, por la Kongreso, speciala prezentado de la opero « Rigoletto ». Skizo pri la verko en tiu ĉi n-ro helpas al kompreno.

Ĵaŭdo, 4-a de aŭgusto

8 h. ĝis 9 h. *Fakaj kunsidoj*.

9 h. 30 ĝis 11 h. 30. *Debato* pri « Nasko de intereso pri nia lingvo ĉe la infanoj k ties instruado ». Prezidanto k enkondukanto k-do Guzzi. Pri la unua parto speciale parolos k-do Lentaigne, pri la dua, kun prezentado de rekta metodo, k-do Petro Louis. Poste la parolo estos donata unue al tiuj, kiuj sin anoncis, due al aliaj. La prezidanto konkludos.

11 h. 30 ĝis 11 h. 45. *Parolata gazeto*.

14 h. ĝis 18 h. 30. a) *Vizito* al la Efekturo por la gek-doĵ, kiuj havas kongres-numeron de 751 ĝis la lastaj enskribiĝoj.

b) por la ceteraj kongresantoj, vizito al : Luvro, Katedralo, Montmartro, Palaco de la Eltrovoj, Muzeo de l'Homino, Modernaj Artoj, Gobelin-manufakturo (limigita nombro).

20 h. 30 ĝis 23 h. 30. *Ferma vespero*. Revueto « Bonan blagon ! Kiel vi farsas ? » sub la gvidado de la humoristo Schwartz. Kabareto, Dancoj. Baio. Kontribuajoj de la diverslandaj kongresantoj.

Vendredo, 5-a de aŭgusto

Ekskurso al Fontenblo

7 h. 30. El la gastejoj A k B la gek-doĵ foriros aŭtobuse.

7 h. 40. Kiuj ne loĝas en tiuj gastejoj, devas esti sur la placo antaŭ la Katedralo (metro-stacio « Cité »). Ĉiuj aŭtobusoj eliros el Parizo en « Porte de Charenton », Nacia Vojo n° 5.

8 h. 30. *Matena kuniĝo* de la aŭtobusoj en vojkruĉiĝo « Pompadour » (Carrefour Pompadour) je 3 km. post Maisons-Alfort.

La aŭtobusa karavano, 1 km. longa, konsistanta el ĉirkaŭ 30 veturiloj, veturos al Fontenblo tra Villeneuve-Saint-Georges, Sénart-arbaro, Melun.

10 h. Halto k disigiĝo ĉe la vojkruĉiĝo « Carrefour du Grand-Veneur ».

a) piedirantoj forlasos la aŭtobusojn por fari 10 km. ekskurson tra la arbaro al Gorj' de Franŝar' (Gorges de Franchard).

b) Aŭtobusoj n-oj 1 ĝis 15 veturos al la kastelo. La gek-doĵ el tiuj aŭtobusoj, kiuj ne deziras viziti la kastelon, povos translokiĝi al la ceteraj aŭtobusoj (kie ili devos chle stari).

c) Aŭtobusoj n-oj 16 k ceteraj veturos tra la arbaro.

12 h. *Tagneza kuniĝo* en Gorj' de Franŝar' (Gorges de Franchard). Komuna manĝo. La gastejanoj ricevos el la karavan-gvidantoj malvarman manĝon. Trinkajon oni povos akiri en arbara domo : limonado, biero, vino, cidro. Se oni forportas botelon, oni devas lasi garantian repagotan, kiam oni realportas ĝin malplena.

Restoracio povas akcepti 100 personojn. Tre bona manĝo : 500 fr. inkluzive trinkmono, sed sen trinkaĵo. (Oni devis jam sin anonci plej malfrue dimanĉon 31-an matene).

14 h. Kiuj vizitis la kastelon matene, vizitos la arbaron postmanĝe k inverse.

18 h.15. *Vespera kuniĝo* en vojkruĉiĝo de la « Cefa Cashundisto » (Carrefour du Grand Veneur), Nacia vojo n-o 7.

La aŭtobusoj reiros karavane Parizon tra Corbeil, Orly, Porte d'Italie, avenue d'Italie, Pont d'Iéna, Quai de New-York.

20 h. *Adiaŭoj sur la teraso de Saĵo-Palaco*. La gek-doĵ, kiuj ne partoprenis la ekskurson, bonvolu ĉeesti tiujn lastajn kongresajn momentojn.

Subteriĝo en « Trokadero » al la gastejoj aŭ stacidomoj.

Sabato, 6-a de aŭgusto

Ekskurso al Versajo

Vi jam enskribiĝis k pagis vian vojaĝon ĉe la Informejo.

Matene vizito al la Kastelo.

Tagmanĝo en la parko (vi kunprenis manĝon). Atentu pri la indikoj de la gvidantoj, ĉar ne ie ajn oni rajtas instaligi tiucele.

Vizito al Granda k Malgranda « Trianon » k al la Farmodomaro de Maria Antonia (Hameau de Marie-Antoinette).

Je la 16 h. reveturo al Parizo.

Sekvantaj tagoj

Por la gek-doĵ, kiuj daŭre restos, vizitoj estos organizataj, sed ne laŭ rigida programo. La gek-doĵ elektos mem la vizitajn lokojn.

Al tiu ĉi programo povos esti alportataj sugaĵoj k pli detalaj klarigoj, kiuj estos diskonigataj mikrofone.

POSTKONGRESAJ VOJAĜOJ

Ĉar ni ricevis multajn petojn, ni devis finfine organizi 4 ekskursojn.

1. *Al Bretonio*, aŭtobuse, por 30 personoj, prezo : 9.000 fr. De sabato la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto.

2. *FranCIAJ Alpoj k Genevo (Svisio)*, aŭtobuse, por 40 personoj, prezo : 9.800 fr. De lundo la 8-a ĝis lundo 15-a de aŭgusto.

3. *Marsejlo*, aŭtobuse aŭ vagonare (decidota lastmomente), por 40 personoj, prezo : 10.500 fr. de sabato la 6-a ĝis dimanĉo 14-a de aŭgusto.

4. *Kasteloj de la Loir-valo*, aŭtobuse, por 40 personoj, prezo : 5.800 fr. De dimanĉo la 7-a ĝis vendredo 12-a de aŭgusto.

Por la kvar vojaĝoj la revenoj okazos al Parizo; tiam vi povos tranokti k manĝi en la gastejoj.

La pagoj por tiuj vojaĝoj okazu tuj ĉe vian alveno en Parizo. Se vi prokrastas je kelkaj tagoj, aliaj prenos vian lokon.

GVIDILAJ DISKOJ

Rondaj tabuletoj fiksitaj al stangoj, numeritaj de 1 ĝis 30, estos utiligataj en :

Stacidomoj, vespera promenado, gravaj vizitoj, fakaj kunsidoj, Fontenblo-ekskurso, ktp.

Por la stacidomoj ili servos por krei grupojn al la diversaj gastejoj.

Por la promenado k vizitoj, por krei grupojn de ĉ. 40 personoj. Oni sekvu la portanton de la disko, kiu montras la vojon k donos klarigojn. Oni restu ĉiam kun la unue elektita gvidanto.

En ĉiu aŭtobuso de la ekskurso estos disko. Tio ebligos retrovi facile sian aŭtobuson k siajn pakajojn.

INSIGNOJ

Sur la metala parto estas fiksita paperpeco. Sur ĝi vi povas noti laŭplaĉe vian nomon, vian SAT-matrikulon aŭ kongresnumeron, vian pseŭdonimon konstantan aŭ dumkongresan; vi povas desegni aŭ desegniĝi floron, beston, alegorion. La imagokapablo havos liberan terenon.

SKIZO PRI LA PROGRAMO

Tagoj	8 - 9	9.30 - 11.30		12 - 14	14 - 15.30	16 - 18.30	18.30 - 20.30	20.30 - 23.30
S		Disdonado de dokumentoj		Mango	Promenado		Mango	Interfratiga vespero
D	Fakoj Servoj	Laborkunsido		"	Fotado	Laborkunsido	"	Vespera promenado
L	Fakoj Servoj	Laborkunsido		"	Aŭtobusa promenado	Urbdomo	"	Debato
Ma	Fakoj Servoj	Prelego	Prelego	"	Fakoj	Vizitoj	"	Debato
Me	Fakoj Servoj	Prelego	Prelego	"	Vizitoj k promenadoj Duono de la kongreso al Efel-turo		"	Opero
Ĵ	Fakoj Servoj	Debato		"	Vizitoj k promenadoj Duono de la kongreso al Efel-turo		"	Ferma vespero
V		Ekskurso al Fontenblo						Adiaŭoj sur Ŝajo-teraso

FAKAJ K FRAKIAJ KUNSIDOJ

Tagoj horoj	Partero		Amfiteatro		Saloneto malantaŭ scenejo	Dua saloneto malantaŭ scenejo
	disko 1	disko 2	disko 3	disko 4	disko 5	disko 6
Dimanĉe 8 ĝis 9 h.			Hispana L.E.A.			
Lunde 8 ĝis 9 h.	Junul-Fako	Abundo	Vegetaranoj	Liberpensuloj	LEA-Komitato	Teknikistoj
Marde 8 ĝis 9 h.	Sennaciistoj	Biokosma Solidaro	Klasbatalo	Komunistoj		Trockistoj
Marde (1) 14 ĝis 15 h. 30	Fervojistoj	Poŝtistoj	Jurnalistoj	Presistoj	LEA-Komitato	Maristoj
Merkrede 8 ĝis 9 h.	Pacistoj	Radio-amatoroj	Sindikatistoj	Urbaj transport-laboristoj		Kooperanoj
Ĵaude 8 ĝis 9 h.	Social-demokratoj	Sportistoj	Anarkistoj	Belami-movado	Literatura Komitato	Natur-amikoj

(1) Instruistoj k edukistoj kunvenos, en aparta salono, marde inter la 14 k 15 h. 30.

TRI DEMANDOJ AL MALNOVA ANO

— Kiam vi demandas min, ĉu mi, post 33-jara esperantisteco, refoje komencus lerni esperanton, mi respondos « Jes ! ».

— Kiam vi demandas min, ĉu mi, post la multjaraj spertoj en la publika vivo, refoje entuziasme aprobus la fondon de organizo kia estas SAT, mi respondos « Jes ! ».

— Kaj kiam vi demandas min, kiun eon aŭ gvidprincipon inter la multaj, kiujn SAT-anoj flegadas k praktikadas, bezonas nian specialan flegadon, ke ĝi kresku samforte kiel la aliaj, mi respondos: « La toleremon ! ».

Konrad DEUBLER.

Nia sennacieca asocio

Pro la neeblo ĝiri tuj la kongres-kotizojn al Parizo, O.K.K. eldonis:

- la kongres-markojn en Ĉekoslovakio;
- la provizorajn kongres-kartojn en Germanio;
- la invitkartojn en Finnlando;
- la gvidlibron en Danio;
- du numerojn de la *Voĉo* k la kongres-tekojn en Nederlando.

Estu Akurataj !

Kial ni kongresas? Por pridiskuti organizajn aferojn, kleriĝi, viziti. Pro tiuj celoj la programo estas plenplena. Vi do ne perdu tempon en vanaj sencelaj vagadoj. Atentu! Ĉio komenciĝos je la indikitaj horoj, vi malutilus al la kongreso k al vi mem, se vi ne venus akurate al ĉiuj rendezuoj.

Laborkunsidoj

Tri laborkunsidoj havas lokon en la programo. Tio devas sufiĉi por pritrakti ĉiujn organizajn problemojn. Ni estu koncizaj en la intervenoj k intervenu ne simple por aŭdigi nian voĉon; nur kiam necesas. Ordo regu en niaj kunvenoj k ĉiu minuto estu plene k racie utiligata.

Gvid-libro pri Parizo

Eldonita okaze de la SAT-kongreso ĝi ne estas traduko de jam ekzistanta gvidilo. Ĝi estas produkto de pacienca laboro fare de kolektivo de SAT-anoj; interaliaj ni citu: Bulcourt (antaŭparolo), Cronfalt (promenadoj k mapoj), Laval k Literatura Komitato de SAT por la kontrolo de la lingvo, k por la presado... niaj amikoj de Aarhus.

Ni estas konvinkitaj ke ĝi utilos al la kongresantoj por la vizito de la urbo k ankaŭ al la dekoj da SAT-anoj, kiuj ĉiujare vizitas Parizon. Por ĉiuj ĝi estos bela memorajo k taŭga propagandilo. Ĉiu kongresanto ricevas po unu ekzemplero, krome ĝi estas akirebla ĉe la libroservo.

Infan-renkontiĝo

De la 21-a ĝis la 28-a de julio okazis speciala semajno por infanoj. Venis karavanoj el Britio kun gek-doj Melton k el Sudfrancio kun gek-doj Lentaigne. Gastigataj en « Estonto » ili ĝuis tre varian programon. Dum la kongreso oni raportos pri tiu renkontiĝo k ni devos esplori ĉu simila aranĝo povus esti farata okaze de ĉiu SAT-kongreso.

La kongresanoj notu, ke la SAT-Oficejo (67, avenuo Gambetta, Paris-20) restos fermita pro la kongreso de sabato 30-a de julio ĝis sabato 6-a aŭgusto inclusive. Deĵoranto ĉe la Librovendejo en la kongresejo.

LA PROPONOJ AL LA 22-a KONGRESO DE SAT

Propono 1a

La Kongreso de SAT konsilu la elekton de komisiono por esplori la eblecon de ŝanĝoj en la datoj por la jaraj kongresoj de SAT.

L. ROSENBLUM (4.305).

Propono 2a

Aldono al la 3a paragrafo de la Statuto : Post: akceptinte ĉi tiun statuton, aldoni interkrampe la literon (a) Post la fino de l'3a paragrafo klarigi tiel la intencojn de (a) : Ĉiu SAT-peranto (urba, distrikta, landa) k la Plenumkomitato disponigas la statuton al la aliĝantoj. Ĉi tiuj petas en kelkaj linioj sian aliĝon, esp-lingve, k mencias, ke ili legis k akceptis la statuton. La P.K. liveros la membrokarton k registros la aliĝon nur post ricevo de tiu deklaro.

SABRIER (19.671).

Propono 3a

Aldoni al la statutparagrafo 5 (antaŭa 6) jenan alineon : « La partopreno al kongreso k ĝuo de ties avantaĝoj ne devas esti konsiderataj kiel ĝenerala servo por la subtenantaj membroj, krom se ili konformigas al la dua alineo de la paragrafo 18 (antaŭa 19) ».

CHILAND (16.356).

Propono 4a

Aldoni al paragr. 18 (antaŭa 19) jenan alineon : Rajtas aliĝi la kongreson kiel aktiva membro aŭ gasto nur la personoj, kiuj subskribis aliĝilon, sur kiu troviĝu devige jena frazo :

Mi scias, ke, dum la kongresaj manifestacioj ĉiuspecaj, mi rajtas paroli nur esp-on, por ne malvalorigi tiujn manifestaciojn. Mi rekonas al la O.K.K. la rajton min eksigi el la kongreso k ties diversaj aranĝoj, sen mona kompenso, se mi ne respektas tiun regulon.

CHILAND (16.356).

Motivigo : La statuto mutas pri kongresantoj, kiuj ne povas aŭ ne volas paroli esp-on.

Rim. de l' P.K. : Praktike ni opinias tiun prop. nerealegebla.

Propono 5a

La Kongreso esploru la demandon pri reaperrigo de « Sennacieca Revuo ».

R. MILON (25.623).

Propono 6a

Ĉar la nuntempa tarifo de la Libroservo, baziĝanta sur dolaro, tre malfavoras la gekdojn el Francio, la kongreso elektu alian monunuon por la zono, kie cirkulas la franca franko.

R. MILON (25.623).

Propono 7a

La 22a Kongreso, konstatante, ke kelkaj k-doĵ kies spirito ne kongruas kun la plej elementaj SAT-principoj, aliĝis la Asocion, konsianta, ke senpripensa varbado de membroj povas konduki al degenero de la ekzistprinciparo de nia movado, — decidis : 1. Konsili al ĉiuj membroj ne instigi al SAT-anigo homojn kies ideologio estas fremda al tiu de SAT; 2. havigi al ĉiuj novaliĝintoj la statuton de SAT; 3. aperiĝi en la Jarlibro nur la nomojn k adresojn de k-doĵ, kiuj kotizis almenaŭ 2 sinsekvajn jarojn; 4. atentigi la Organ. Kongres-Komitatojn pri la neceso de severaj kondiĉoj por malebliĝi, ke favoraj kongreskotizoj por SAT-anoj neniel okazigu aniĝon de turistaj esperantistoj neŭtralaj.

L. PELGRIM (22.366 Roterd.).
R. BURNAZEL (21.793 Parizo).

Propono 8a

La Kongreso decidu elekti ĉiujare, prefere jam en la 22a kongreso, komitaton, konsistantan el 3 anoj de ekster la franca regiono, al kiu la kasisto de la Plenum-Komitato sendu detalan kasraporton, kiun supre nomita komitato esploru k informu pri ĝi en sekvonta kongreso. Plue la P.K. sendu similan raporton, almenaŭ superriĝardon pri la financoj, antaŭ la Kongreso, al la landaj k lokaj perantoj. Ĉi tiu raporto anstataŭu tiun en S-ulo, por ke la anoj almenaŭ iel estu informitaj pri la financa stato de la Asocio por prijuĝi ĝin en la Kongreso.

6 Arnhemaj SAT-anoj (matrik. 18.398, 15.546, 20.627, 19.569, 19.423, 23.800).

Propono 9a

La Plenum-Komitato de SAT konsistu estontece el kamaradoj, apartenantaj al minimume tri diversaj politikaj tendencoj.

La redakcio de Sennaciulo konsistu el almenaŭ du redaktoroj diverstendencaj k diverslandaj.

C.J. COPPENS (20.284).

MOTIVIGO. — La nuna SAT-gvidantaro apartenas ekskluzive al la Sennacieca tendenco k — konscie aŭ ne — forte influas nian Asocion laŭ siaj ideoj. P.K. k redaktoro agas, kvazaŭ nur ili reprezentas la « veran SAT-ideologion » k devas eduki la ali-tendencanojn al sia « pli ĝusta » kompreno. Tio ege ĝenas la aliajn. Ili sentas sin kvazaŭ duarangajn membrojn.

Tion ni plej bone povos eviti per elektado de diverstendencaj funkcinuloj en la gvidajn instancojn. Kolektiva redakcio krome povos zorgi por pli varia (k do pli interesa) enhavo de la gazeto.

RIM. DE LA P.K. — Tiu propono tute kontraŭas al la principo, laŭ kiu la Asocio devas esti supertendencna, — k eĉ kontraŭas la par. 3 de la frakci-regularo, laŭ kiu la Frakcioj ne rajtas interveni kiel tiaj en la funkciado de SAT. Resume, la P.K. povas bone realigi sian taskon nur kondiĉe ke : 1. ĝi havu la senrezervan fidon de la anaro; 2. inter la P.K.-anoj regu reciproka fido, eĉ se ideoj ili apartenas al div. tendencoj; 3. ĝi estu ŝirmata kontraŭ la influo de iu ajn tendenco. — La P.K. devas apliki la Statuton, k ĝi estas respondeca antaŭ la membraro entute, ne antaŭ la tendencoj.

Ĉi-sekvaj tri proponoj devis aperi en unu el la lastaj numeroj de Sennaciulo! Bedaŭrinde k-do Kruit sendis ilin ne rekte al la SAT-Oficejo, sed pere de parizano; tiu ĉi k-do komunikis la paperon al k-do Banner, sed en momento ne favora por atenta meditado, tiel ke k-do B., distrate, redonis la paperon k tute forgesis pri ĝia ekzisto. Tial do ni publikigas la tekston ĉi tie. Ĉe la kongreso mem ni prezentos nian defendan argumentadon; ĝi estas tro longa por aperi en tiu ĉi paĝo. — P.K. de SAT 21-6-1949.

Propono 10a

La Kongreso malaprobas la manieron, laŭ kiu la Plenum-Komitato aranĝis la enoficigon de nova redaktoro por Sennaciulo.

MOTIVIGO. — Malgraŭ la formala rajto de P.K. eksigi kaj enoficigi, necesas observi ĉe la apliko de tiu rajto kamaradecajn formojn.

Propono 11a

La Kongreso nomu komisionon, kiu :

a) esploru la dezirindecon kaj eblecon anstataŭigi la nunan formon de kongresaj voĉdonoj kaj eventuala posta referendumo per aranĝo, kiu pli kontentige solvos la problemon de demokrataj decidoj en la organizo;

b) ellaboru pli konkretan kaj precizan formulon por la elekto de Plenum-Komitato kaj redaktoro de S-ulo.

Propono 12a

La Kongreso petu P.K. agadi, por ke la Lingva Komitato (nun nomata « Akademio ») ricevu ordan kaj organizan bazon en la Esperanto-Movado.

MOTIVIGO. — La nuna arbitra kaj tro memstara agado de la personoj, nun gvidantaj la « Lingva Komitato » ne estas akceptebla por la esperantistaro kaj la signifo de L.K. estas tro grava por nia movado, ol ke ni povus simple ignori ĝin.

W.F. KRUIT (18.148).

RAPORTO DE LA KONFLIKT-KOMISIONO

Tiu teksto alinjis nur nur post apero de la julia S-ulo, nome la 28 junio. Tial ni publikigas ĝin ĉi-loke. — P.K.

Pro eraro la komisiono starigis nur antaŭ kelkaj monatoj. Ĝi do ne jam tre normale povis funkcii. Tamen la gek-doĵ, akceptinte ĉifine la taskon, k-kofoje kunvenis por trakti feliĉe ne tre multajn aferojn. Leteron de k-do Veder el Usono unu el la komitatoj prezentos en la kongreso mem, ĉar ĝi ne rilatas iun konflikton.

Plendon de k-do Wels el Rotterdam, rilate la agon de P.K., pri necnspresigo de artikolo, la komitato traktis. La artikolo estis verkita kiel defendo al rezolucio subskribita de 20 francaj gek-doĵ. Tiu rezolucio aperis en la febr. n-o. Ĉar la enhavo laŭ k-do Wels estas ofenda al parto el la SAT-anaro, li sendis supre nomitan defendartikolon. La sekr-ino korespondis pri la afero kun P.K., klopodante trovi mezan vojon inter la du partioj k se eble, tamen doni al k-do Wels okazon defendi sin en nia organo S-ulo.

La respondo de P.K. certigis nin pri la penoj jam faritaj en tiu direkto. Oni jam grave reduktis la enhavon de la rezolucio, k ĉar la publikigo de la teksto de k-do Wels eble revekus la diskutojn, la redakcio ne ŝatis presigi ĝin. Kontentigan rezulton K.K. do ne tute atingis. Tamen ĝi esprimas la deziron, ke ĝenerale ĉiuj SAT-anoj klopodu kiom eble apliki la toleremon en nia organo. La mondo ja estas jam plena de kvereloj.

Ke almenaŭ ekzistu unu Asocio, kie rajtoj k devoj estu egalaj al ĉiuj tendencoj, estas la deziro de K.K.

H. OUDENHOVEN-BISHOFF, sekr.

Voĉdonoj

La SAT-anoj ricevis bluan kongreskarton, kiu enhavas 6 voĉdon-biletojn.

Kiam prezidanto petos voĉdonon per levitaj kartoĵ, la gek-doĵ montru la bildan flankon al la voĉdon-kontrolantoj.

Kiam la prezidanto petos voĉdonon per kupono, la gek-doĵ agu jene :

Tomas pri la 1-a propono. Oni eltrance la kuponon, kiu surportas « Por (1-a propono), kontraŭ » ;

Oni deziras voĉdoni « Por », oni formetu (eltrance) la parton, kiu portas la vorton « kontraŭ » ;

Oni deziras voĉdoni « Kontraŭ », oni formetu eltrance la vorton « Por » ;

Oni deziras sindeteni, oni donu al la voĉdon-kontrolantoj nur la parton « 1-a propono » .

Pri la bileto « Venonta kongres-urbo » oni eventuale notu la elektitan urbon, okaze se estos pluraj invitoj.

INTERVJUO AL KELKAJ SAT-VETERANOJ

SAT travivis skismojn k mond militon. Ĝi eldonis sufiĉe gravan literaturon k bonajn gazetojn. Ĝi iniciatis k eldonis la Plenan Vortaron, la unua vortaro kompleta, uzebla de ĉiuj esperantistoj. Sennaciulo estas unu el la plej reliefaj Esperanto-gazetoj.

Meze de la postmilita malamo, SAT organizis tutmondan solidarservon profite al k-doĵ el landoj plej kruele militviktimoj. Nun nia asocio arigas en sia sino almenaŭ la duonon de la organizitaj Esperanto-praktikantoj. La SAT-kongresoj atingis la gravon de tiuj el la neŭtrala movado.

SAT estas nun 28-jara. Ekde ĝia naskiĝo ĝis nun vi, kamarado, restis fidela al nia mondorganizo. Certe la legantoj de «La Voĉo de l' Kongreso» ŝatos koni viajn nunajn impresojn pri nia movado. Ĉu post tiu dua mond milito iuj principoj, kiuj gvidis vin en 1921-1922, aspektas al vi kadukaj k ŝanĝindaj?

Pro teknikaj motivoj intervjuoj ne povis aperi en n° 4 de la Voĉo; ni do estis devigataj ĉi tie publikigi nur la plej reliefajn partojn de la respondoj.

RESPONDO DE K-DO BANNIER, SAT-ano 11

Esperantisto de post 1906 (mi estis 13-jara), ĝis 1918 mi partoprenis la movadon nur kiel kotizanto. Mi memoras, ke, tamen, jam en 1914 mi ŝatis la Hodler-ismen, ĉar ĝi, mia opinio, organizis la esperantistojn laŭ la plej racia maniero, en si mem tre revolucia, nome: individua aliĝo por bari al ĉia in-fluo nacieca...

En 1919 mi kontaktis kun Lanti, tiu barbulo kies herezaj ideoj timigis multajn, eĉ inter la t.n. ekstremaj maldekstruloj de tiu epoko. Jam delonge mi sopiris al aktiveco utila por esperanto. Nu, liaj planoj plaĉis al mi; li vokis helpantojn; mi tuj fariĝis unu el ĉi tiuj!

De tiam, nur de tiam, mia vivo havas socian sencen; pro tiu mensa metamorfozo mi sentas ian fieron; mi estas konvinkita, ke per tia kunlaborado en la fondo k gvidado de SAT mi kontribuis al la socia progreso pli ol per pasiva kotizado al sindikato aŭ partio...

SAT estas la sola asocio, kies strukturo pleje kongruas kun la intima celo de esperanto k ankaŭ kun la kontinua transformiĝo de la inter-homaj rilatoj. Sen tiu strukturo, sen la kreado de kulturo komuna por la tuta planedo, esperanto estas nur distraĵo, kiu ne pravigas la plej etan oferon de tempo. Esperantistoj, kies pensa horizonto ne transumas la nacian kadron, ankaŭ kiuj obstine stagnas eĉ la jam arkaiĝinta etapo de inter-naciismo, tiuj estas vole-nevole reaktuloj, almenaŭ rutinuloj.

Esperanto havas celon tute apartan, kiun neniu nacia lingvo, eĉ la plej uzata k polurita, kapablas atingi, nome: sennacieciĝi la spiritojn, prepari la homojn al rolo de, ne fikcia k efemera, sed de fakta k konscia Civitano de l' Mondo.

La sennacieca administrado de la planedo metos la universalan teknikon k la ĉiaspecajn naturarojn utilajn je la dispono ne plu de difinitaj homgrupoj, sed de la tuta homaro.

SAT estas la embrio de tiu estonta Socio. Jen kial mi restis k restas fidela al la originaj principoj de SAT, kiuj, spite ĉiujn kritikojn k mokojn, daŭre validas.

Utopio l ne...; ĉiaokaze mi rifuzas elspezi minutojn por la konservado de sistemo, kia estas la divido de l' Mondo en naciojn, k kiu, tra du militoj pruvigis sian «maltaŭgecon» por la prospero de la Homaro.

RESPONDO DE K-DO L. GLODO, SAT-ano 50

Mi lernis esperanton nur pro idealistaj motivoj; mia lernado komenciĝis 15 jarojn antaŭ la fondiĝo de SAT. Kiam Lanti starigis antaŭ ni sian planon, fondi asocion laŭ la Hodler' a sistemo (U.E.A.) sed kun klasbatalaj principoj, mi tuj akceptis esti unu el la helpantoj de tiu provo. «Se post kelkaj jaroj montriĝos, ke ni elektis eraran vojon» diris Lanti «ni simple konfesos nian pekon k rebenos al U.E.A.»

La sennacieco, la klasbatalo, la klerigado restas hodiaŭ kiel antaŭ 28 jaroj la rokaj fundamentoj de nia asocio, spite de pluraj skismoj. Ĉu tio ne sufiĉas por resti fidela al la asocio?

Estas malfacile laŭdi organizon, al kies fondo mi partoprenis. Nedubeble nia moto «For la neŭtralismon» multe helpis la progreson de la tutmonda lingva ideo en la laboristaj tavoloj, ĝi montris al la laborista publiko, ke nia movado ne estas dandeca k komparebla al iu savarmeo.

SAT alportis al la esperantistaro la nepran laborilon (malnova projekto de Zamenhof), por normigi k sennacieciĝi la lingvon. La plena vortaro estas tiu ilo. Hodiaŭ ĝi estas agnoskita kiel unu el la fundamentaj verkoj de nia lingvo. Lastjare SAT kreis novan instancon, la «Literatura komitato de SAT»; nur la vivo montros, ĉu nia asocio kapablos kompetente kontroli la esperantan literaturon.

Per konstanta k obstina uzado de la lingvo, SAT kreis kernon de «mondcivilitanoj», kiuj kutimiĝis al eksternacia sent-pens-k agadkapablo. Mia partopreno al 12 SAT-kongresoj tute aliĝis mian pensmanieron; mi sentas min pli forte ligata per amikaj sentoj al kamaradoj kiel Lerchner, Deubler, Bartelmes, Muribo, k aliaj pioniroj de nia asocio, ol mi estas ligata al samurbanoj miaj.

La gvidprincipoj restas gustaj: plej bona pruvo estas, ke neniam ni bezonis reveni al la internacia organizformo, nek malkonfesi nian klasbatalon, nek forlasi «For la neŭtralismon». Post 28-jara vivo la arbo havas vivajn radikojn, niaj kongresoj konfirmas tiun aserton.

RESPONDO DE K-DO LERCHNER, SAT-ano 90

En la jaro 1921 niaj parizaj k-doĵ k aliaj laboristaj esp-istoj, grandparte «Liberrigstelanoj» tiel preparis la kampon, ke ni povis kune kun UEA-kongreso en aŭgusto aranĝi ankaŭ SAT-kongreson. Ĉi tiu unua kongreso en Prago estis nur laborkunveno en ĝusta senco de la vorto. Antaŭe ni aranĝis en Dresdeno malgrandan antaŭkongreson, kie ni provizore starigis laborprogramon. Ĉiuj estis scivolaj, kiel funkcioj la interkompreniĝo kun la eksterlandaj k-doĵ. Nu, ĝi estis bonega. La parizaj k-doĵ jam aperis kun preta statutaro. Nia gvidprincipo ja estis labori, por kiel eble plej rapide konstrui internacian lab. esp. organizon. Dum aliaj promenis, ni laboris. En iu lerneja ĉambro ni traktis niajn problemojn. Paragrafo post paragrafo, la statuto estas traktita. Ĉio iris glate, nur titolo k sektorkarto kaŭzis pli longan diskuton. Mi kredas, ke eĉ hodiaŭ multaj SAT-anoj ne ĝuste komprenas la titolon de nia Asocio. Krome rezolucio estis unuanime akceptita. SAT estis fondita.

La presado de l'gazeto en Francio ne plu eblis pro financaj konsideroj. Sekve ni eluzis la inflacion en G. k tiel la financa obstaklo estis venkita. La presado povis okazi en L., k nun komenciĝis kresko k prosperado de la Asocio. La Asocio eldonis librojn, gazetojn, en 1924 eĉ semajnan gazeton, krom la monata. Eldoniĝis libro post libro. Tiu ĉi sana k normala kreskado daŭris tiom longe, kiel ni estis unuecaj k harmoniaj. Kiam la harmonio estis ĝenata flanko de skismuloj, la Asocio malsanis k regresis. El tiu sperto mi avertas la SAT-anaron, esti harmoniaj k toleremaj. Tiom forta ne estas la esp. movado, ke ĝi povas toleri disigon. Nur en la unueco kuŝas forto!

Plue, konsiderante la nunan situacion en la esp. movado, mi konkludas, ke granda parto de la homaro ne ankoraŭ komprenis la utilon de esperanto por la internacia laborularo. La historia disvolviĝo prezentas al ni la mondon en du partoj. Terura dilemo!

Poŝtaj aferoj

Poŝta ĝiceto estas malfermata eĉ la vestiblo de la kongresejo. Ĝi utiligas specialan kongresstampon. Esperantistaj oficistoj afable vin informos k servos.



Libro-brokantistoj eĉ la kajoj.

(Photo Yvon)

NIAJ GASTEJOJ

KATEGORIO A.

- Antaŭen**, Lycée Montaigne, 17, rue Auguste-Comte. — Metro-stacio : « Notre-Dame des Champs ».
- Estonto**, Collège Chaptal, 45, rue des Batignolles. — Metro-stacio : « Rome ».
- Universo**, Ecole normale d'Auteuil, 10, rue Molitor. — Metro-stacio : « Michel-Ange-Molitor » aŭ « Chardon-Lagache ».
- Zamenhof**, Lycée Saint-Louis, 44, boulevard Saint-Michel. — Metro-stacio : « Odéon ».

KATEGORIO B.

- Frateco**, Ecole, rue d'Arcueil, Bagneux. — Metro-stacio : « Bagneux » (« Pont-Royal »).
- Hodler**, Ecole, rue de Marseille. — Metro-stacioj : « République » aŭ « Jacques-Bonsergent ».
- Lanti**, Ecole, rue Lebel, Vincennes. — Metro-stacio : « Bérault ».
- Espero**, Ecole, 1, avenue Sainte-Marie, Saint-Mandé. — Metro-stacio : « Porte Dorée ».

KATEGORIO C.

- Libero**, Tendaro en Rue Barbet-de-Jouy. — Metro-stacio : « Invalides ».

N. B. — Ordo k pureco estas postulataj en la gastejoj. Post difinita horo silento devas regi. Vi zorge atentu pri la informoj k postuloj de la respondeculoj. Ne forgesu, ke de la nuna ĝenerala sinteno dependas niaj rilatoj estontaj kun la Ministerio pri Edukado.

RESPONDO DE K-DO G.P. DE BRUIN SAT-ano 670

Kiam en 1921 la pioniroj de SAT fondis nian organizon, la novaj ideoj, kiujn ili proklamis, eĉe estis jenaj : 1° laboristaj esperantistoj devas organizi sin memstare k aparte; 2° la organizo de laboristoj esperantistoj devas esti ne « internacia » (konsistanta el naciaj sekcioj), sed « sennacia » (senpera membreco de ĉiu ano aparte); 3° ili devas ne nur propagandi la lingvon, sed precipe uzi praktike en servo de la laborista movado.

Ĉu tiuj ideoj validas ankoraŭ nun, aŭ ĉu ili jam parte aŭ tute senvalorigis? Estas facile konstati, ke por penetrigi nian lingvon en laboristajn rondojn, por lernigi ĝin al laboristoj (kiuj ofte posedas nur tre elementan lingvoscion), por konvinki la laboristan movadon pri utilo k seriozo de nia afero, necesas tute aparta maniero de agado k apartaj metodoj de propagando, instruo, ktp. Esperanto estas por ni ja ne celo ensi-mem, sed helpilo en la batalo por socialista socio. Ke ni por tio bezonas apartan organizon, pri tio ne povas ekzisti dubo.

La fakto, ke neunulingvaj mondorganizaĵoj bezonas naciajn sekciojn por peradi la kontakton inter membroj k estraro, pro kio ili ne povas organiziĝi alie ol « internacie », neniel devigas la esperantistojn, ke ankaŭ ili organizu sin tiel. Nin ne dividas lingvobaroj; ĉe ni eĉ la plej simpla membro povas libere interrilati kun ĉiu alia, kial do ni bezonas ankoraŭ tiun interŝtupon : la nacia sekcio? Krome, per nia sennacieca organizo ni kutimigas niajn membrojn senti sin ne naciaj, sed tutmondaj, kio tre gravas en la nuna tempo, kiam pli k pli montriĝas, ke nur la unuiĝo de la homaro sur la tuta terĝlobo ebligas eviti mondkatastrofon. Cetere la sperto montris, ke la internacia organizo por esperanto-organizaĵoj ne prezentas iajn avantaĝojn.

La uzado de esperanto por praktikaj laboristaj celoj havas ankoraŭ la saman gravon, kiel antaŭe. Mi opinias, ke tiun punkton oni atentus tro malmulte en la nuna tempo. Sendube SAT ankoraŭ informas, kle-

rigas k edukas siajn membrojn per sia gazeto k literaturo, per ebligado de skriba k parola kontakto. Sed pli frue SAT pli multe rekte servis la laboristan movadon per liverado de gravaj tradukoj el niaj gazetoj k de alimaniere akiritaj interesa materialo.

Sajnas al mi, ke sur tiu kampo ni ne multe progresis en la lastaj 20 jaroj, eble eĉ malprogresis. Por rekonkeri tiun teron k plivastigi ĝin ni bezonas : 1° pli ampleksan aŭ pli ofte aperantan gazeton; 2° pli da interesaj, aktualaj, al la reala vivo k ĉiutaga batalo de la laboristaro adaptitaj artikoloj; 3° spertajn aktivulojn kiuj povos liveri al la redakcio la bezonatan materialon.

INFORMEJO

Ĝi funkeios plene de la 8 h. ĝis 9 h. 30, de la 11 h. 30 ĝis 12 h., de la 18 h. 30 ĝis 19 h., k dum 15 minutoj antaŭ la vesperaj kunvenoj.

Informo pri la kongreso, la urbo, la vizitoj, la Fontenblo-ekskurso, la postkongresaj aranĝoj, la horaro de la vagonaroj, ktp.

Koresponduloj ricevitaj : estos indikataj sur speciala tabulo la nomoj de ricevintoj. Prezantante vian kongreskarton, vi ricevos la poŝtadon.

Interkontaktigo de kongresantoj : oni petu slipon k zorge plenigu ĝin. Sur speciala tabulo estos notita la nomo de P k-do, kiun vi deziras kontaktigi; li tiel pere de la Informejo ekscios pri via ĉesto, via deziro, loko k horo de rendevuo.

Perditaj, trovitaj objektoj : a) perditaj la k-do plenigu slipon al li liverotan kun nomo k kongresnumero, detale priskribu la objekton; b) trovitaj - tuj deponi ilin ĉe la Informejo; la trovinto lasu nomon k numeron sur slipo ligota al la objekto.

Fervojaj rabatiloj : Nepre stampigu ilin en la Informejo.

ATENTIGO! Ne iru al la Informejo por habili, estu konciza, faciligu la laboron de la deĵorantoj, kiuj devos solvi amason da demandoj.

RIGOLETO por la Kongresanoj!

Rigoletto, itala opero en 4 aktoj, paroloj de Piave, muziko de Verdi (Venecio, 11 an de marto 1851). La fama italia majstro elektis mem la temon laŭ la dramo de Viktor Hugo : *Le roi s'amuse* (La reĝo amuziĝas). Verdi ĉerpis majstre la materialon en la dramo de la franca poeto. Venecio, kiu tiam estis sub la Aŭstria regado, ne permesis pro cenzuro-motivoj la prezentadon de la verko, kiu nomiĝis : « La Maledizione » (Fatala Malfeliĉo). Anstataŭ prezenti la reĝon, oni decidis substitui liun per la dukino de Mantovo, k ke la verko nomiĝu : Rigoletto, buffone di corte (Rigoletto, burleskulo de l'kortejo). La teatraĵo okazas en Mantovo en la 16-a jarcento. La partituro estas unu el la plej kortuŝaj de Verdi. La unua akto estas nur la prezento de la verko. Sed ekde la dua akto en la domo de Rigoletto, la interesiĝo grandigas ĝis la fino. La dueto de Rigoletto k de la bandito Sparafucile estas drame intenseca; tiu, kiun li kantas kun sia filino Gilda, estas kortuŝa, pasio kun gracio elreliefiĝas el tiu de Gilda kun la dukino; la sceno de la forrabo estas kolorplena. Necesas citi en la tria akto la akran kritikon de Rigoletto kontraŭ korteganojn : *Korteganoj, aĉa k damnita raso*. La lasta akto prezentas post la kanto de l'duko : *Kiel plum'en vento*, la faman kvarteton, kiu estas kvazaŭ ia duobla dueto.

Notinde estas ke la dramon de Viktor Hugo oni malpermesis ekde la unua prezento en 1832 pro severaj aludoj kontraŭ la kortego. Li konstruis sian dramon sur la antitezo inter la diboĉa k bruta reĝo k burleskulo, kiu sub malgraciaj aspektoj personigas patrean amon.

Malsanuloj!

Dum la kongreso gek-doĵ konstante deĵoros ĉe la flego-servo.

En la kongresejo vi vin direktu al la Informejo.

Dum la vespera promenado la servo sekvas fine de la vico.

Dum la ekskurso al Fontenblo ĝi sidos en la lasta aŭtobuso.

Dum la fotado, en Urbdomo, en Operdomo, vi vin turnu al O.K.K.-ano.

Gek-doĵ, kiuj havas kapablojn pri flegado, helpu al la servo-sin turnu al la Informejo.

« La Voĉo de l'Kongreso »

La du unuaj numeroj estis presataj en Amsterdamo dank' al la afabla helpemo de k-do Bultemeyer. Tio ebligis utiligi parton de la tesa kongresa kapitalo. Tiu ĉi n-o estis presata en Parizo.

La tri numeroj konsistigas utilan propagandan materialon. Ĉu ne ĝojigus amikojn, kiuj ne povis veni Parizon, ricevi ĝin? Akireblaj ili estas ĉe la libro-servo. Prezo : 10 fr. por ekzemplero.

INTERVJUO AL KELKAJ SAT-FUNKCIULOJ

LIBRO-SERVO

En la SAT-aparato vi tenas postenon, kiu ebligas al vi, en la sfero de via agado, havi rigardon sur la evoluadon de nia mondon-ganizo. Certe vi akceptas konigi al la legantoj de La Voĉo viajn esperojn pri SAT k speciale la rolon, kiun devas ludi niaj kongresoj.

Respondo de K-do SULSKY, SAT-konsilanto por SATEB

SAT-kongresoj helpas al la ordinara laboristoj renkonti samklasanojn k sammetianojn el aliaj landoj. Ili povas diskuti inter si pri viv-k laborokondiĉoj k pri la organizformoj ekzistantaj. Per tiuj diskutoj ili fariĝas pli kleraj laboristoj k multe pli valoraj en la klasbatalo.

SAT, estante kleriga asocio por laboristoj, devas havi en siaj vicoj ne nur membrojn el ĉiuj tendencoj, sed ankaŭ el ĉiuj landoj. Malfeliĉe pro la skismo en 1931, la komunistaj k sovetaĵaj membroj forlasis la asocion.

Mia espero por la estonto estas, ke SAT denove fariĝu organizo, en kiu ĉiuj harmonie kunlaboros por pli bona sociordo k ke en ĝiaj vicoj troviĝos laboristoj el ĉiuj landoj. Nur tiam ĝi plene ludos la rolon de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Respondo de k-do Leonhard PUFF, SAT-Peranto por Germanio

Ke en Germanio relative multaj iamaj SAT-anoj ne fariĝis la lakeoj de P'hitlerismo, sendube tion dankas tiuj anoj esence al la celklara edukado, kiun ili spertis dum multaj jaroj en la kadro de SAT, ankaŭ nelegece post 1933. Tial ne estas mirinde ke tiuj post likvido de P'firanco la SAT-anoj serĉis per ĉiuj rimedoj kontakton kun SAT-Direkto k iamaj korespondantoj. Ĉi rilate ni neniam povos forgesi la valorajn helpojn de gek-doĵ Klodja k Dejarden, nelaste ankaŭ la bonvolon k reale solidaran sintenon de SAT, kiu liveris al ni dum jaroj, spite valutajn malfacilaĵojn, la SAT-organon regule, krom tre utila literaturo. Intertempe kolckligis en Germanio denove konsiderinda nombro da SAT-anoj...

Dum la kongresoj ne renkontiĝu plezurvojaĝantoj k konferenc-vaguloj, sed homoj, kiuj ŝatas gravan kulturalaboron... SAT-kongresoj instruu, ke ne naciista superemo devas dikti malamon inter la homaro. Per personaj interparoloj la gek-doĵ ekonos, ke per la ŝvito k sango de P'popoloj la ĉiulandaj friponoj jam ĉiutempe lerte komercis, ŝtraktante la diligentajn amasojn.

Nenun ni atingos sen laboro k senlaca klopodado. Ni bezonos ankaŭ estonte idealistojn!

Respondo de k-do W.F. KRUIT, Sekretario de LEA-Komitato de SAT

Unu el la plej malnovaj aspiroj de socialista movado estas la forigo de landlimoj kaj la harmonia kunagado de ĉiuj socialistoj, sendepende de rasaj aŭ naciaj diferencoj. La devizo « Proletoj el ĉiuj landoj-unuiĝu » estas, malgraŭ sia deveno, ne tipe marksista ideo, sed la intima « kredo » de ĉiu socialista.

Ankoraŭ ne falis la limaj baroj (kvankam ie kaj ie ili jam montras siajn velkemon kaj forigemon), kaj ankaŭ kulture kaj organize la laboristaro ankoraŭ baraktas en sia nacia apartigo. Tamen jam ekzistas ĝermo de nova supernacia kaj superrasa organizo de la laboristaro, nome: SAT.

Ĝia membraro estas ankoraŭ malgranda kaj kiel organizo SAT devas fronti grandajn malfacilaĵojn, tamen ĝi estas io konkreta kaj praktika kontraste al la nebulaĵaj kaj

abstraktaj ideoj, ankoraŭ regantaj en la neesperantista (bedaŭrinde plej granda) parto de la laboristaro...

Mi insistas pri tiu principa flanko, ĉar oni emas serĉi en SAT kaj trudi al SAT principojn kaj ideojn, kiuj ne estas konformaj al ĝi kaj sekve malfavoras ĝian disvastigon kaj progreson.

SAT estas nek politika partio nek sindikato aŭ io tia, sed la enkorpiĝo de la idealo pri supernacia kaj superrasa kunagado en socialista senco. Malgraŭ nia diverseco de opinioj koncerne socialistajn ideologiojn ni ne forgesu ĉi tiun bazan koncepton, kiu interlige kun larĝvida toleremo kondiĉas kaj... garantias la prosperan evoluon de SAT kaj povos kreskigi la etan ĝermon al matura kaj valora frukto de la homa kulturo.

NIAJ KONGRESOJ

Post kelkaj tagoj la 22a eniros la historion de la SAT-kongresoj. Estos interese por nia membraro scii, kie la SAT-movado trovis apogon por sia evoluo.

Memore ni diru, ke 1-a kongreso okazis en la sama urbo kiel la Universala Esperanto Kongreso. De 1921 nia movado sekvis sian propran vojon. Hodiaŭ nia asocio arigas (verŝajne) la plej grandan nombron de organizitaj esperanto-praktikantoj en la mondo.

Jen la listo de la kongres-urboj kun nombro da partoprenantoj:

1921	Prago	80
1922	Frankfurt	230
1923	Kasel	250
1924	Bruselo	90
1925	Vieno	150
1926	Leningrado	400
1927	Liono	200
1928	Gotenburgo	436
1929	Leipzig	650
1930	Londono	350
1931	Amsterdamo	400
1932	Stuttgart	245
1933	Stokholmo	600
1934	Valencio	376
1935	Parizo	346
1936	Manĉestro	167
1937	Roterdamo	806
1938	Bruselo	659
1939	Kopenhago	568
1947	Aarhus	662
1948	Amsterdamo	1.219
1949	Parizo	?

Okazis do kongresoj en:

Aŭstrio 1, Belgio 2, Britio 2, Ĉeĥoslovakio 1, Danio 2, Francio 3, Germanio 4, Hispanio 1, Nederlando 3, Sovetio 1, Svedio 2.

PROVIZORA TAGORDO DE LA LABORKUNSIDOJ

Unua kunsido: Salutvortoj de la O.K.K. Oficiala malfermo de la Kongreso, fare de P.K.

Elektio de la kongresaj funkciuloj (prezidantaro, protokolantoj, propon-komisiono, voĉdon-komitato, financa komisiono).

Debato pri la Raporto de la P.K.

Dua kunsido: Daŭrigo de la debato pri la raporto de la P.K. k K.K.

Komenco de la pritrakto de la Proponoj publikigitaj en S-ulo k en Voĉo.

Tria kunsido: Fino de la debato pri la Proponoj. Deziroesprimado pri venontjara Kongresurbo. Gvidrezolucio. Eventualajoj.

Le Gérant: PUÉCHAGUT.

L'EMANCIPATRICE, Paris (15^e). — 14458-749

Ilustritaj poŝtkartoj, 20 bildoj pri Parizo, kun esperanta teksto, serio de 5.....	60 »
Tranciloj (kun esp. bildoj).....	300 »
Flagetoj por biciklo aŭ dorsosako (kun la literoj SAT aŭ neŭtrala).....	70 »
Kovertoj (SAT-kongreso) 25 ekz.....	50 »
Portreto de Zamenhof (teksita silko).....	60 »
Plena Vortaro.....	1.000 »
(la SAT-anoj nur 800 fr. por sia propra ekz.)	
Leteroj de L.L. Zamenhof (prezentitaj de G. Waringhien), bindita..	800 »
(La SAT-anoj nur 640 fr. por sia propra ekz.)	
Verkoj de E. Lanti:	
Vortoj de K-do Lanti (192 p.).....	200 »
Leteroj de E. Lanti (280 pag.).....	300 »
Naciismo (originalo, 124 paĝoj).....	120 »
For la neŭtralismon (32 paĝoj).....	50 »
Skizo pri filozofio de la homa digno (145 paĝoj).....	150 »
La Laborista Esperantismo.....	30 »
Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio? (en kunlaboro).....	40 »

Aliaj SAT-eldonoj:

La Fera kalkanumo (J. London).....	200 »
Jimmie Higgins (U. Sinclair).....	200 »
Skizo de ekonomia geografio.....	200 »
Etiko (Kropotkin).....	200 »
Neĝulino (ilustrita).....	200 »
Homoj en milito (bindita).....	360 »
Juneca ardo (Bartelmes).....	150 »
Diablidoj (Bartelmes).....	75 »
Al la junuloj (Kropotkin).....	100 »
Kristanismo kaj patriotismo.....	100 »
La Komunista Manifesto.....	100 »
La Liberecana socio.....	100 »
Ili (L. Bergiers).....	60 »
Fabeloj (Herminja).....	50 »
Ruĝo kaj blanko.....	50 »
A.B.C. de Sennaciismo.....	50 »

Tradukoj de L.L. Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio, 460 paĝoj	300 »
Fabeloj de Andersen, 3-a vo.....	150 »
Hamleto (Shakespeare).....	100 »
La Rabeno de Baharah (Heine).....	75 »
Ifigenio en Taŭrido (Goethe).....	120 »
La Rabistoj (Schiller).....	150 »
La Revizoro (Gogol).....	120 »
Georgo Dandin (Molière).....	60 »

Aliaj aŭtoroj:

La nevenkebla ĝeno (bindita).....	420 »
Esperanto 60-jara (kartonita).....	175 »
Vivo de Zola.....	120 »
Leteroj al Brigito.....	90 »
La Faraono, tr. Kabe (3 vol.).....	600 »
La Fundo de l'Mizero, tr. Kabe.....	50 »
La Stranga Butiko, R. Schwartz.....	75 »
Vojaĝo interne de mia ĉambro.....	45 »
Amŝtriono (Molière).....	45 »
Sveda laborista movado.....	50 »
Misisipi.....	180 »
Pinokjo (bindita).....	280 »
Morto de trajno (bindita).....	500 »
Vivo de Zamenhof (bindita).....	280 »
La Dormanto vekigas (bindita).....	280 »
Undino (bindita).....	280 »
Antonio k Kleopatro.....	140 »
Du amosantaj noveloj.....	110 »
Ĉe la sanktaj akvoj:	
1-a vol.	170 »
2-a vol.	300 »
Ni devas diri ĝin.....	110 »
La Knaboj de Paŭlo Strato.....	80 »
Fabloj de J. de La Fontaine.....	100 »
Sub la Verda Standardo, lernolibro por infanoj, ilustrita.....	210 »
La naiveco de pastro Brown, bindita	280 »
La aventuroj de Marteno Drake, bindita	280 »
Faŭsto I, re-eldono, lukse bindita..	720 »
Komentario al Faŭsto.....	90 »

MALGRANDA GVIDILO TRA FRANCLINGVIO

Ĉi sube listo de kelkaj vortoj kiujn la kongresantoj povus bezoni en siaj kontaktoj kun ne esperantistoj. Unue, la esp.-vorto, due la proksimuma prononco de la koresponda franca vorto (akcento sur la lasta silabo), trie la franca vorto. Tiu ĉi lasta povus esti montrata al la alparolalo okaze ke perbuŝaj provoj restu sensukcesaj.

aĉeli	<i>aŝte</i>	acheter	lakto	<i>le</i>	lait
akvo	<i>o</i>	eau	legomo	<i>legüm</i>	légume
apoteko	<i>farmasi</i>	pharmacie	malsana	<i>malad</i>	malade
aŭtobuso	<i>otobüs</i>	autobus	mangi	<i>manje</i>	manger
aŭto luebla	<i>taksi</i>	taxi	matenmango	<i>pti dejner</i>	petit déjeuner
banko	<i>bank</i>	banque	tagmango	<i>dejner</i>	déjeuner
bano	<i>ben</i>	bain	vespermango	<i>dine</i>	diner
bileto	<i>bije</i>	billet	mi	<i>moa</i>	moi
bona	<i>bon</i>	bon	al mi	<i>a moa</i>	à moi
malbona	<i>move</i>	mauvais	por mi	<i>pür moa</i>	pour moi
bonan fagon	<i>bonjur</i>	bonjour	inono	<i>arjan</i>	argent
bonan vesperon	<i>bonsuar</i>	bonsoir	morgaŭ	<i>dmen</i>	demain
butero	<i>ber</i>	beurre	multe	<i>boku</i>	beaucoup
cigaredo	<i>sigaret</i>	cigarette	malmulte	<i>p'</i>	peu
ĉambro	<i>ŝambr</i>	chambre	nokto	<i>nüi</i>	nuit
malpli kosta	<i>ŝambr muen</i>	chambre moins	necesejo	<i>ŭater</i>	W.-C.
ĉambro	<i>ŝer</i>	chère	pagi	<i>peje</i>	payer
dankon	<i>mersi</i>	merci	pano	<i>pen</i>	pain
donu	<i>done</i>	donnez	papero	<i>papje</i>	papier
donu al mi	<i>done mua</i>	donnez-moi	peti	<i>prie</i>	prier
eksterlandano	<i>etranje</i>	étranger	mi netas	<i>ŝvu pri</i>	je vous prie
mi estas ekster-	<i>ŝ' süi etranje</i>	je suis étranger	poŝtkesto	<i>buat o letr</i>	boîte aux lettres
landano			poŝtmarko	<i>tembr</i>	timbre
eliro	<i>sorti</i>	sortie	rapide	<i>vit</i>	vite
eniro	<i>antre</i>	entrée	restoracio	<i>restoran</i>	restaurant
fermita	<i>ferme</i>	fermé	salato	<i>salad</i>	salade
malfermita	<i>uber</i>	ouvert	salo	<i>sel</i>	sel
fiŝajo	<i>poason</i>	poisson	stacio « Maubert-	<i>stasjon « Mober-</i>	station « Maubert-
franko-frankoj	<i>fran</i>	franc, francs	Mutualité »	<i>Mütüalite »</i>	Mutualité »
fromaĝo	<i>fromaj</i>	fromage	stacidomo	<i>gar</i>	gare
frukto	<i>früi</i>	fruit	strato	<i>rü</i>	rue
fumi	<i>füme</i>	fumer	sufiĉe	<i>ase</i>	assez
ĝis revido	<i>orvuar</i>	au revoir	sukero	<i>sükr</i>	sucré
hieraŭ	<i>jer</i>	hier	ŝangi	<i>ŝanje</i>	changer
hodiaŭ	<i>oĵurdüi</i>	aujourd'hui	tago	<i>ŝur</i>	jour
horo	<i>er</i>	heure	telefono	<i>telefon</i>	téléphone
kioma horo estas?	<i>kel er e'il?</i>	quelle heure est-il?	tie ĉi	<i>isi</i>	ici
je kioma horo	<i>a kel her manj</i>	à quelle heure	trinki	<i>büar</i>	boire
oni mangas?	<i>ton?</i>	mange-t-on?	varma	<i>ŝo</i>	chaud
hospitalo	<i>opital</i>	hôpital	varmeta	<i>tjed</i>	tiède
hotelo	<i>otel</i>	hôtel	malvarma	<i>früa</i>	froid
kafo	<i>kafe</i>	café	vegetara	<i>vejetarjen</i>	végétarien
kafo kun lakto	<i>kafe o le</i>	café au lait	veki	<i>reveje</i>	réveiller
kelnero	<i>garŝon</i>	garçon	veku min frue	<i>reveje moa d</i>	réveillez-moi de
kiam	<i>kan</i>	quand		<i>bon er</i>	bonne heure
kie	<i>u</i>	où	veturigu min al	<i>mne moa a</i>	menez-moi à
kiom	<i>kombjen</i>	combien	viando	<i>viand</i>	viande
kuracisto	<i>dokter</i>	docteur	vino	<i>ven</i>	vin

KELKAJ ŜILDOJ K SURSKRIBOJ

ascenseur
attention
boîte aux lettres
boulangier
complet
correspondance
défense de fumer
descente interdite
eau potable
eau non potable
entrée
escalier mécanique
passage interdit
renseignements
sortie
toilettes, lavabos, W.-C.

lifto
atentu
leterkesto
panvendisto
plenplena
korespondo
ne fumu
ne malsupreniru
trinkebla akvo
netrinkebla akvo
enirejo
aŭtomata ŝtuparo
ne trapasu
informoj
elirejo
tualetejo, necesejo